

ESPERANTO

世界语趣味会话

艾伯特·利恩哈尔特 著

徐婉芬 译



北京市世界语协会

ALBERT LIENHARDT

Amuzaj Dialogoj

世界语趣味会话

艾伯特·利恩哈尔特 著

徐 婉 芬 译

北京市世界语协会

1981·北京

世界语趣味会话

艾伯特·利恩哈尔特 著

徐 婉 芬 译

出版者：北京市世界语协会

经售处：绿原书刊服务社

（北京2908信箱）

787×1092¹/₃₂ 5 8/₁₆印张 120千字

1981年8月第1次印刷

工本费：每册0.85元

〔内部发行〕

译者的话

世界语的创始者柴门霍夫博士说过：“只要我们认真保持世界语简便易学的特点，我们终将胜利。”

这本小册子从很多方面体现了世界语的这个特点。第一，尽量使用常见字，尽量不用生僻字。第二，努力避免笨重的合成词，特别是可能发生歧义或引起误解的合成词。当然，有些合成词并不算笨重，而且很有用，作者在使用这些合成词时，都用间隔符号把词的结构分开，便于初学者学习。第三，没有那种使人头痛的包含多种成分的复杂句型，真正做到了口语化。有时由于谈话双方能够充分理解彼此的思想，在对话时只用一个代词、一个副词或一个叹词，就表现了一个完整句子的意思，本来口语练习正应该如此。罗嗦重复、叠床架屋，完全是不必要的。

由此可见，作者编写这本书，确实是下了一番功夫的，但是这也给翻译和核稿带来了很大的困难。既要贴切原文，又要适应汉语口语习惯，在工作过程中，不免时时感到力不从心。但是，想到各地世界语运动的蓬勃开展，想到世界语爱好者希望有一本会话材料的迫切要求，也就只好勉为其难，姑且把它作为和广大世界语者共同学习的一次习作吧。译文中的差错，欢迎读者指正。

这本小册子，早在1973年就由国际世界语协会(UEA)印行，1980年在匈牙利又出了第二版。原著中有个别不必要的段落，已予省略。

1981年8月

ENHAVO

1. Sinjoro Adek renkontas sinjorinon Boll
2. Sinjoro Adek renkontas sinjoron Boll
3. Sinjorino Adek renkontas sinjorinon Boll
4. Sinjorino Adek vokas sian dek-jaran filon Stefano
5. Stefano renkontas sian dek-jaran kamaradon Bruno
6. Sinjoro Boll volas iri kun sia filino Helga aĉeti mangaĵojn
7. Sinjoro Adek iras al la frizisto
8. Sinjorino Diss parolas kun aŭtomobilo-servisto
9. Sinjoro Boll parolas tag-meze kun sia edzino
10. Petro Diss havas rendezuon kun sia fianĉino Suzanna Miller
11. Sinjoro Adek parolas kun kelnero en kafejo
12. Alekso, 16-jara filo de sinjoro Boll, deziras ion
13. Sinjoro Adek promesas al sia edzino Marta fariĝi pli hejmeca
14. Sinjorino Boll eksplikas al sia edzo, ke ŝi deziras aŭtomobili
15. Mikaela Miller renkontas sian amikinin Gizela Garcia
16. Petro Diss renkontas sian kolegon Roberto Renner
17. Sinjorino Adek renkontas sinjorinon Diss
18. Francisko Adek, 20-jara, alparolas junulinon en la urbo-parko
19. Sinjorino Boll konsultas doktoron Lovatti
20. Sinjoro Miller kaj lia edzino faras ekskurson

目 录

- 1 阿代克先生(阿)遇见波尔太太(波) 3
- 2 阿代克先生(阿)遇见波尔先生(波) 9
- 3 阿代克太太(阿)遇见波尔太太(波) 15
- 4 阿代克太太(阿)呼唤十岁的儿子斯戴芳(斯) 21
- 5 斯戴芳(斯)遇见十岁的小伙伴布鲁诺(布) 27
- 6 波尔先生(波)打算和自己的女儿海尔卡(海)一起
 去买食品 35
- 7 阿代克先生(阿)到理发师(符)那里去 41
- 8 荻斯太太(荻)同汽车服务员(斯)的谈话 49
- 9 波尔先生(波)中午跟自己的妻子(埃)的谈话 55
- 10 彼得·荻斯(彼)跟未婚妻苏珊娜·米莱尔(苏)的约会 63
- 11 阿代克先生(阿)在咖啡馆里跟服务员(柯)的谈话 71
- 12 波尔先生(波)的十六岁儿子阿莱克斯(阿)的心愿 77
- 13 阿代克先生(阿)答应妻子玛尔塔(玛)更多地操劳
 家务 87
- 14 波尔太太(波)向丈夫(埃)说明自己想开汽车 93
- 15 米哈艾拉·米莱尔(米)遇见自己的女朋友吉
 塞拉·加尔奇娅(吉) 103
- 16 彼得·荻斯(彼)遇见自己的同学罗伯特·伦纳(罗) 117
- 17 阿代克太太(阿)遇见荻斯太太(荻) 121
- 18 二十岁的弗朗西斯科·阿代克(阿)在公园里
 与一个姑娘(尤)交谈 133
- 19 波尔太太(波)请罗瓦蒂大夫(罗)看病 147
- 20 米莱尔先生(米)和他的妻子(埃)旅行 157

**DIALOGO n-ro 1: Sinjoro Adek (A.) renkontas
sinjorinon Boll (B.)**

- A. 1. Bonan tagon, sinjorino Boll!
- B. 1. Bonan tagon, sinjoro Adek!
- A. 2. Kiel vi fartas, kara sinjorino?
- B. 2. Mi dankas. Mi fartas bone. Kaj vi?
- A. 3. Mi estas kontenta. Dankon! — Ĉu ankaŭ via familio fartas bone?
- B. 3. Jes. Feliĉe. — Kaj la via?
- A. 4. Ankaŭ. Ĉiuj anoj de mia familio estas en bona sano.
- B. 4. Tio estas la ĉefa afero.
- A. 5. Ĉu tiu knabo estas via filo?
- B. 5. Jes. Li estas mia filo Bruno.
- A. 6. Kaj tiu ĉarma knabino? Ĉu ŝi estas via filino?
- B. 6. Jes. Ŝi estas mia filino Luiza.
- A. 7. Ili estas belaj infanoj.
- B. 7. Ĉu vi trovas?
- A. 8. Jes. Vere. Mi gratulas vin.
- B. 8. Mi dankas pro la komplimento.
- A. 9. Ne estas dankinde, kara sinjorino. — Via filo multe similas al vi.
- B. 9. Oni jam diris tion al mi.
- A.10. Okazas ofte, ke filoj similas al la patrino.

1 阿代克先生(阿)遇见波尔太太(波)

阿 1 您好，波尔太太！

波 1 您好，阿代克先生。

阿 2 亲爱的太太，您的身体好吗？

波 2 谢谢，我很好。您呢？

阿 3 还好，谢谢！——您的家也好吗？

波 3 好，都很好。——您的家呢？

阿 4 同样，我们全家都很健康。

波 4 身体好是首要的事。

阿 5 这个孩子是您的儿子吗？

波 5 是的，他是我的儿子布鲁诺。

阿 6 那个漂亮的姑娘呢！她是您的女儿吗？

波 6 是的。她是我的女儿露伊莎。

阿 7 他们都是漂亮的孩子。

波 7 您这么认为吗？

阿 8 是的，真漂亮。我祝贺您。

波 8 谢谢您的夸奖。

阿 9 亲爱的太太，不值得谢。——您的儿子很象您。

波 9 人家都对我这么说。

阿 10 常常是儿子象母亲。

- B.10. Tio estas vera. Kaj, same, filinoj ofte similas al la patro.
- A.11. Vi tute pravas, sinjorino Boll. — Estas bela tago hodiaŭ. Ĉu ne?
- B.11. Jes, efektive. La vetero estas agrabla.
- A.12. Ĝi invitas por fari promenon.
- B.12. Ho, mi farus volonte. Sed mi devas fari multajn aĉetojn.
- A.13. Mi komprenas. Mi ne volas reteni vin. Eble vi ne havas tempon....
- B.13. Jes. Mi devas rapidi. Mi ne havas multe da tempo.
- A.14. Do, mi deziras al vi bonan tag-finon, kara sinjorino
- B.14. Dankon, sinjoro. Mi deziras al vi la samon.
- A.15. Bon-volu saluti vian edzon, mi petas!
- B.15. Volonte. Salutu same vian edzinon!
- A.16. Dankon. Ĝis revido, sinjorino Boll!
- B.16. Ĝis revido, sinjoro Adek!

Didaktikaj demandoj kaj respondoj pri la dialogo n-ro 1.

1. Kion diras sinjoro Adek al sinjorino Boll?
— (Respondo:) Li deziras al ŝi "bonan tagon".
2. Kiel fartas la sinjorino?
— Ŝi fartas bone.
3. Kiel fartas la familio de sinjorino Boll?
— Ankaŭ ŝia familio fartas bone.
4. Ĉu estas la samo pri la familianoj de sinjoro Adek?
— Jes. Estas same.
5. Kiu estas la juna knabo?
— Li estas la filo de sinjorino Boll

- 波10 这是真的。同样，女儿往往象父亲。
- 阿11 波尔太太，您说的完全正确。——今天的天气很好，是吗？
- 波11 是的，确实好。好天气使人感到愉快。
- 阿12 这是吸引人去散步的天气。
- 波12 嗨，我很乐意去散步，不过我得去买好些东西。
- 阿13 我明白了，不耽误您啦。您也许没有时间……
- 波13 是的，我得赶紧走，没有多少时间了。
- 阿14 那么，亲爱的太太，祝您一天愉快。
- 波14 谢谢，先生。我也祝愿您。
- 阿15 请代向您丈夫问好！
- 波15 好，也请您代向您妻子问好！
- 阿16 谢谢。波尔太太，再见！
- 波16 阿代克先生，再见！

教学问答(1)

1. 阿代克先生跟波尔太太说了什么？
—答：他向她问好。
2. 这位太太身体怎么样？
—她身体很健康。
3. 波尔太太的全家好吗？
—她全家也很好。
4. 阿代克全家同样好吗？
—是的。同样好。
5. 那个孩子是谁？
—他是波尔太太的儿子。

6. Kiu estas lia nomo?
— Lia nomo estas Bruno.
7. Kiu estas la ĉarma knabino?
— Si estas la filino de la sinjorino.
8. Kiu estas ŝia nomo?
— Sia nomo estas Luiza.
9. Kion diras sinjoro Adek pri la du infanoj?
— Li diras, ke ili estas belaj.
10. Kion respondas la patrino de la infanoj?
— Si dankas al la sinjoro pro lia komplimento.
11. Kion diras sinjoro Adek pri la knabo Bruno?
— Li trovas, ke Bruno multe similas al sia patrino.
12. Kion opinias sinjorino Boll pri tio?
— Si diras, ke oni jam diris tion al ŝi.
13. Kion diras sinjoro Adek poste?
— Li diras, ke filoj ofte similas al la patrino.
14. Ĉu sinjorino Boll opinias same?
— Jes. Si havas la saman opinion. Si eĉ aldonas, ke filinoj ofte similas al la patro.
15. Kion ankoraŭ diras sinjoro Adek?
— Li ankoraŭ diras, ke la bela vetero invitas fari promenon.
16. Kion diras la sinjorino pri tio?
— Si diras, ke ŝi volonte farus promenon; sed ŝi devas fari multajn aĉetojn.
17. Kion nun diras sinjoro Adek?
— Li diras, ke li ne volas reteni ŝin.
18. Kaj ŝi? Kion ŝi diras?
— Si diras, ke ŝi ne havas multe da tempo. Si devas rapidi.
19. Kion li deziras al ŝi?
— Li deziras al ŝi "bonan tag-finon".

6. 他叫什么名字?
—他叫布鲁诺。
7. 那漂亮的姑娘是谁?
—她是这位太太的女儿。
8. 她叫什么名字?
—她叫露伊莎。
9. 关于这两个孩子，阿代克先生讲了些什么?
—他说，他们长得很漂亮。
10. 孩子的妈妈是怎么回答的呢?
—她谢谢那位先生的夸奖。
11. 关于那个男孩布鲁诺，阿代克先生说了些什么呢?
—他说，布鲁诺很象自己的妈妈。
12. 对此波尔太太是怎么说的?
—她说，人家都这么对她说。
13. 后来阿代克先生说了些什么呢?
—他说，儿子往往象妈妈。
14. 波尔太太也这么认为吗?
—是的，她也这么认为。她还说女儿往往象爸爸。
15. 阿代克先生还说了些什么呢?
—他还说，这是吸引着人去散步的好天气。
16. 对此这位太太说了些什么呢?
—她说，她很乐意去散步，不过她得去买好些东西。
17. 阿代克先生现在说什么呢?
—他说，那就不想耽误她了。
18. 而她呢？她还说了什么？
—她说，她没有多少时间了，她得赶紧走。
19. 他祝愿她什么？
—祝她“一天愉快”。

20. Kion ŝi deziras al li?
—Ŝi deziras al li la samon.
21. Antaŭ ol for-iri, kion diras sinjoro Adek al sinjorino Boll?
—Li petas ŝin: “Bon-volu saluti vian edzon!”
22. Kion ŝi diras tiam?
—Ŝi petas lin: “Salutu vian edzinon!”
23. Kion diras ambaŭ personoj, ĉe la fino de la konversacio?
—Ili diras: “Ĝis revido!”

**DIALOGO n-ro 2: Sinjoro Adek (A.)
renkontas sinjoron Boll (B.)**

- A. 1. Bonan matenon, sinjoro Boll!
- B. 1. Bonan matenon, sinjoro Adek!
- A. 2. Ĉu vi fartas bone?
- B. 2. Ne tute bone. Sed iom pli bone.
- A. 3. Estas bone, ke vi fartas pli bone.
- B. 3. Certe Sed estus pli bone, se mi fartus bone!
- A. 4. Kompreneble. — Tio, vere, estas kurioza hazardo.
- B. 4. Hazardo? Kial?
- A. 5. Jus, antaŭ unu minuto, mi renkontis vian edzinon.
- B. 5. Kie vi renkontis ŝin?
- A. 6. Antaŭ la magazeno “INNO”.
- B. 6. Se ŝi eniris, ŝi restos tie dum almenaŭ unu horo.
- A. 7. Ĉu vi kredas?
- B. 7. Jes. Sendube. En tiu rilato, mi bone konas mian edzinon.
- A. 8. La mia estas tute sama.
- B. 8. Nu, oni ne povas ŝanĝi tion. — Jen, prenu cigaredon!

20. 她祝愿他什么？

—她对他作了同样的祝愿。

21. 在分手之前，阿代克先生跟波尔太太说了些什么？

—他请求说：“请代向您的丈夫问好！”

22. 那时她说了什么呢？

—她请求说：“请代向您的妻子问好！”

23. 这两个人在交谈结束时说了什么？

—他们彼此说：“再见！”

2 阿代克先生（阿）遇见波尔先生（波）

阿 1 早安，波尔先生！

波 1 早安，阿代克先生！

阿 2 您身体好吗？

波 2 不十分好。但比以前好一些了。

阿 3 您的身体好转了，太好了。

波 3 是啊……可是，如果我的身体很健康的话，那就更好了！

阿 4 当然——有件事，真凑巧。

波 4 凑巧？……为什么？

阿 5 刚才，一分钟以前，我遇见您的妻子。

波 5 您在什么地方碰见她的？

阿 6 在印诺商场门口。

波 6 如果她进了商场，那末她至少要在那儿呆上一个小时。

阿 7 您相信吗？

波 7 是的，毫无疑问。在这一方面，我很了解我的妻子。

阿 8 我的妻子也完全一样。

波 8 噢，这是人们不能改变的。——请抽支烟吧！

- A. 9. Dankon. Ne tentu min! Mi ne plu fumas.
- B. 9. Ĉu vere? De kiam?
- A.10. Jam de unu semajno.
- B.10. Vi estas virtulo. Mi gratulas vin.
- A.11. Ne gratulu tro frue!
- B.11. Ĉu vi havos sufiĉe da volo-forto por tute ne plu fumi?
- A.12. Eble ne mi. Sed certe mia edzino...!
- B.12. Ĉu mi ridu? ... Aŭ ĉu mi kompatu vin?
- A.13. Neniu kaŭzo en la nuna momento. Atendu ankoraŭ dum kelkaj semajnoj!
- B.13. Bone, bone. — Mi invitas vin trinki glason da biero.
- A.14. Matene, mi ne ŝatas trinki bieron.
- B.14. Nu, vi trinkos ion alian: kafon, aŭ teon, aŭ konjakon, aŭ brandon....
- A.15. Eble, mi povus preni frukto-sukon.
- B.15. Estas egale. Vi trinkos, kion vi volos. Venu!
- A.16. Volonte. Tie proksime estas malgranda kafejo.
- B.16. Mi proponas iri en la novan bufedon, ĉe la fervojo-stacio.
- A.17. Mi ne konas ĝin. Mi ne jam estis tie.
- B.17. Vi vidos, ke ĝi estas agrabla trinkejo.
- A.18. Ĉu luksa?
- B.18. Tute ne. Sed tre moderna. Kaj la servado estas bonega.
- A.19. Tio ŝajnas interesa. Do, ni iru! Sed mi povos resti dum nur dek minutoj.
- B.19. Kial vi ne povas resti pli longe?
- A.20. Ĉar mi devos iri al la medicina laboratorio, antaŭ la deka horo.
- B.20. Kiel vi volos. Vi estas libera fari laŭ via bon-trovo.

- 阿9 谢谢，不要诱惑我！我不再吸烟了。
- 波9 真的吗？什么时候戒的？
- 阿10 已经一个星期了。
- 波10 您是一个有美德的人，我祝贺您。
- 阿11 不要过早地祝贺。
- 波11 您真的有那么大的毅力，一支也不再抽了吗？
- 阿12 有毅力的不一定是我，而是我的妻子！……
- 波12 这是让我笑话您……还是让我同情您？
- 阿13 您现在还没有理由来笑话我或同情我，过几个星期再说吧。
- 波13 好，好！——我请您去喝杯啤酒。
- 阿14 早晨，我不喜欢喝啤酒。
- 波14 好吧，那您就喝点别的：是咖啡，还是茶；是法国科涅克酒，还是白兰地酒……
- 阿15 也许我可以喝点果汁。
- 波15 完全一样，随您便，请走吧！
- 阿16 好吧，离这儿不远的地方有个小咖啡馆。
- 波16 我建议到火车站旁边新开的酒店去。
- 阿17 那儿我没有去过，不熟悉。
- 波17 您将看到它是一个很舒适的饮食店。
- 阿18 那儿豪华吗？
- 波18 完全不。倒是很现代化，服务很周到。
- 阿19 那倒是很有意思，那末我们走吧！但是我只能在那儿呆十分钟。
- 波19 为什么您不能多呆一会儿？
- 阿20 因为在十点以前我要赶到医学实验室去。
- 波20 那么就随您的便吧。

Didaktikaj demandoj kaj respondoj pri la dialogo n-ro 2.

1. Kion diras la du sinjoroj, unu al la alia?
— Ili deziras “bonan matenon”, unu al la alia.
2. Ĉu sinjoro Boll fartas bone?
— Li diras, ke li ne fartas tre bone.
3. Kiun renkontis sinjoro Adek, antaŭ unu minuto?
— Li renkontis la edzinon de sinjoro Boll.
4. Kie li renkontis sinjorinon Boll?
— Li renkontis ŝin antaŭ la magazeno “INNO”.
5. Kion kredas sinjoro Boll pri sia edzino?
— Li kredas, ke ŝi restados en la magazeno dum unu horo almenaŭ.
6. Kion proponas sinjoro Boll al sinjoro Adek?
— Li proponas cigaredon al li.
7. Ĉu sinjoro Adek akceptas la cigaredon?
— Ne. Li ne akceptas ĝin, ĉar li ne plu fumas.
8. De kiam sinjoro Adek ne plu fumas?
— Li diras, ke li ne plu fumas de unu semajno.
9. Ĉu sinjoro Adek havos sufiĉe da volo-forto por persisti?
— Eble ne li; sed, ŝajne, lia edzino...
10. Kion ankoraŭ proponas sinjoro Boll al sinjoro Adek?
— Li invitas lin trinki glason da biero.
11. Ĉu sinjoro Adek konsentas pri tio?
— Li konsentas iri kun sinjoro Boll; sed li ne volas trinki bieron.
12. Ĉu li intencas trinki kafon, aŭ lakton, aŭ teon, aŭ eble konjakon?
— Ŝajnas, ke li volas preni frukto-sukon.
13. En kiun kafejon iras la du sinjoroj?
— Ili iras en la novan bufedon, apud la fervojo-stacio.
14. Ĉu ĝi estas kafejo luksa?
— Ne. Ĝi ne estas luksa. Sed tre moderna.